

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1990 - 1


(JANUARO - FEBRUARO - MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Stranga besto



... Kaj la Templanoj (fino)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Stranga Besto	3
La templanoj (II) (S. Boniol)	4-5
Universalismo (II) (F. Boyet)	6-8
Projektoj de universala lingvo (A. Frangeul)	9-10
Vivu la angla lingvo (R.Rossetti)	11
La ĉevalido (Odd Tangerud)	12-13
Por via distro	14
Paĝo de la geknaboj (A. ChildsMee)	15
La Vivo en Gresillon	16

El Grésillon

Jam en 1989 la vizitantoj de la Esperanto-Domo, almenaŭ tiuj, kiuj jam vizitis ĝin, konstatis novan ŝanĝon: la salono juniĝis, eble pli akceptimiĝis. Nun la sidiloj fariĝis pli "ekologiecaj".

Baldaŭ, ankaŭ en la biblioteko kaj en la oficejo ŝanĝoj videbliĝos: pli da lumo, pli da helo. Pli agrable estos legi en studi en la biblioteko. Ĉu pli agrable ankaŭ en la oficejo pagi siajn restadkostojn?

La 21-an de aprilo okazos la ordinara Ĝenerala Kunveno de la societo "Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj". Antaŭ tiu dato ĉiuj membroj estos ricevintaj la diversajn jarajn raportojn. Ili konstatos, ke la financoj bone fartas kaj, ke la diversaj staĝoj estis same sukcesaj, kiel la antaŭaj. Samtempe ili estos ricevintaj voĉdonilojn por la ĉiu-dua-jara elektado de komitatanoj. Espereble novaj kandidatoj venos por efektive partopreni en la laboro necesa, se ni volas, ke Gresillon ne nur "bone fartu" sed ankaŭ ke ĝi "bone progresu". Nur la partopreno de ĉiuj membroj en la vivo de la Esperanto-Domo per ĉeesto en la Ĝenerala Kunveno aŭ per sendo de la rajtigiloj kaj de la voĉdoniloj donos al la komitatanoj la sufiĉan apogon por plenumo de temporabaj sed ege gravaj laboroj.

Esperanto tra la Mondo

U.E.A.-KONGRESO EN KUBO- La esperanto-redakcio de Radio-Havano lanĉas konkurson:" Viaopinie, kiun gravecon havos por la esperanto-komunumo la okazigon de la 75-a kongreso en Kubo?"; Unua premio: vojaĝo kaj restado por la kongreso.

Omaĝe al la Kongreso estos emisiita speciala poŝtmarko, kaj eldonitaj arĝentaj kaj nikel-kupraj moneroj en malgrandaj serioj.

S.A.T.-KONGRESO EN LINZ- La 63-kongreso de SAT okazos en Aŭstrio de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990. Informoj ĉe: SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris.

DIVERSAJ RENKONTOJ- La kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto okazos en Blois (1-5-06). Informas: R. Pons, 24 Mail P. Charlot, 41000 Blois.

Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Edukistoj (Freinet-movado) okazos en Svedio (1-11-08). Informas: Paul Poisson, 239, rue V. Hugo, F-37540 St Cyr-sur-Loire.

SAT-AMIKARO kongresos (14-17-04) en Bondy je 10 kilometroj de Parizo. Informas: Muguette SADIER, 22 av. P.V. Couturier, Bât. ND, F-93000 Bobigny.

Kultura Centro Esperantista, B.P. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio; La Kvinpetalo,route de Civaux, F-86410 Bouresse kaj Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 Baugé organizas diversajn aranĝojn dum la jaro. Petu informojn kaj programojn de la centroj mem.

EL HUNGARIO- La universitato Loránd Eötvös de Budapeŝto, en kiu jam esperanto estas oficiale instruata kun atribuo de universitataj diplomoj, , organizas Internacian interlingvistikan fakon kun akiro de diplomo.

Hungara esperanto-Asocio estigis la fondaĵon "Talento", modernan organismon por la edukado de infanoj, laŭ la ideoj de Lázló Polgár, psikopedagogo, patro de tri fratinoj olimpiaj ŝakĉampioninoj kaj esperantistinoj. En tiu edukada sistemo esperanto estas la unua fremda lernata lingvo.

EL JUGOSLAVIO- La revuo "Jugoslavia Stelo" revivigis. Gia enhavo estas freŝa, aktuala, malfermita por kontribuaĵoj de la monda esperantistaro. Provekzemplero ricevebla de: Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo, Jugoslavio.

NOVAJ ASOCIOJ- Bangalora Esperanto-Centro: c/o s.s. Pradhan, 97, 24th cross, III Block East, Jayanagar, Bangalore, 560011 India.

Esperantista Klubo de Bangkok, c/o Pho Thamkhajadpaikun, 42 Areesamphan 5, Rama 6 Rd., Phyathai, Bangkok 10400, Thailand.

Esperantista Grupo de Porto Moresbio, c/o John Shadlow, Geography Department, University of PNG, Box 320, University N.C.D., Papua New Guinea.

NOVAJ ELDONAĴOJ- "Trezoro:Esperanta novelarto" (2 vol.), sub redaktado de Reto Rossetti kaj Henri Vatré.

"Vere aŭ fantazie; rakontaro en facila esperanto" de Claude Piron. Rakontoj por pligrandagi laŭgrade la vortprovizon de la leganto.

"Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI". Gvidilo al la elementa kaj meza ekzamenoj kun regularo kaj testoj.

"La bona lingvo" de Claude Piron. Interesa libreto pri evoluo de esperanto.

"Lingvo kaj Vivo. Esperantologiaj Eseoj" de G. Waringhien,2-a eldono.

"Esperanto en Prospektivo" de Giordano Moya; analizo de la penso de Zamenhof en rilato al la esperanto- movado.

"La nova realismo" de Bruno Vogelman: 186 paĝoj.

Novaj literaturaj numeroj de " Franca Esperantisto": Du rakontoj de G. Flaubert, kaj "La edziĝo de Figaro" de Beaumarchais.

Stranga Besto

La granda zoologo Stelo Verdamo jam de pluraj jaroj dediĉis sian tutan tempon al la vivo de stranga besto, kiu pli kaj pli svarmas sur la terglobo. Antaŭ kelkaj semajnoj li publikigis la konkludojn de sia longa laboro en formo de libreto titolita:" Evoluo de la vivo de la Esperantistus Gigantus". Pri kio temas?

Ŝajnas, ke la ĉefaj karakteroj de tiu besto ekzistis jam de longe en la Homo Sapiens, alia besto, kiu de miloj da jaroj regas sur la tero. Sed tiuj karakteroj ne kapablis sin montri tre klare dum jarcentoj pro tio, ke mankis al ili la favoraj cirkonstancoj kaj la forto kapabla enkorpigi tiujn disajn karakterojn. Ĉar la karakteriza trajto de tiu besto estas pacamo. Tiu originala trajto ne povis disvolviĝi en mondo regata de "homo sapiens" -bestoj, el kiuj ĉiu posedis sian propran "saĝecon" kaj provis ĝin perforti al la aliaj, tiamaniere, ke la tuta monda bestaro estis samtempe saĝa kaj malsaĝa. Fine nur antaŭ kelkaj dekoj da jaroj aperis tiu tute nova, originala speco de besto, la Esperantistus Gigantus. Ĝi fariĝis aparta speco pro tio, ke aperis nova elemento de unuigo de la disaj karakteroj, elemento, kiun la eminenta zoologo nomas: "samlingveco". Dank'al tiu unuiga forto la bestoj, kies pacamo ĝis tiam ne trovis komunan ligilon, subite konstatis, ke ili ne plu vane agitis siajn antenojn, sed ke aliaj respondis al ili per samaj anten-movoj. Kaj oni konstatis fenomenon plej strangan ĉefe pro la rapideco de ĝia apero: la koloro de la haŭto de tiuj bestoj ŝanĝiĝis: antaŭe blanka, nigra, flava, ruĝa, ĝi fariĝis verda kaj, miriga afero, sur la brusto de ĉiu besto aperis verda stelo sur blanka disko. La eminenta zoologo insistas pri la maniero laŭ kiu reproduktiĝas la Esperantistus Gigantus. Tre ofte la idoj ĉe la naskiĝo ne estas verdaj; ilia haŭto estas blanka, nigra, flava aŭ ruĝa. Post pli malpli longa tempo ĝi ĝenerale fariĝas verda. Sed la plej stranga fenomeno estas, ke eĉ aĝaj bestoj post kontakto kun la unuiga elemento "samlingveco" alprenas la verdan koloron kaj ankaŭ la plimulton el la komunaj karakteroj kaj fakte fariĝas veraj "Esperantistus Gigantus". Prof. Verdamo ankaŭ rimarkis, ke kelkaj "Esperantistus Gigantus" perdas siajn specajn karakterojn kaj sian koloron. Li opinias, ke tiu modifo devenas de malsano, kiun li ĝis nun ne povas difini, kiun li nomas "deesperantiĝo" kaj opinias devenanta de la jenaj disigaj elementoj: brilodeziro, helpemo-manko aŭ tro granda nombro da memamo-elementoj en la sango, aŭ tuta manko de luktemo en la cerbaj ĉeloj.

En sia konkludo la eminenta profesoro diras, ke li esperas poste verki duan volumon pri la evoluo de la "Esperantistus Gigantus" ĉar ŝajnas, ke tiu evoluo akceliĝas. Li antaŭvidas tempon, kiam la tuta bestaro verdiĝos, kiam ĉiuj antenoj en la mondo ne vane agitiĝos.

Unu el la Strangaj Bestoj



FINO DE

La enigmo de la Templanoj

DE KULMINO ABISMEN- Historiisto skribis, ke eble la plej ruiniga tago por la mondo estis la 13-a de oktobro 1307. Kial Filipo la Bela nepre volis fordetrui la templordenon? Ĝia ĉefmajstro Jacques de Molay tamen estis la bapto-patro de lia tria filo kaj kiam la reĝo mem ne sentis sin sekura en sia palaco Luvro, li gastis en la templa ĉirkaŭbaritejo. Sed li tutforte celis fari kiel eble plej potenca sian nuran reĝolandon. Tial la senlima disvastiĝado de la templanoj lin timigis. Cetere monan kompenson li bezonis, ĉar lia milito en Flandrio elpumpis la trezoron. La judojn li jam elsangigis... Ĉu konfiski la havaĵojn de la templanoj ne estus la taŭga rimedo.? Estas danĝere, ke en la lando staros tia forto, kaj militista kaj superege riĉa.

Oni scias, kiel estis uzataj la denuncoj de eksigitaj monaĥoj; kiel la reĝaj ministroj (interalie la fama Vilhelmo el Nogaret) estis lertaj en falsigado kaj leĝotordo. Oni, ho ve!, scias pri la metodoj de la inkvizicio, pri kiu la reĝo mem estus jene parolinta al la ĉefepiskopo en Toulouse:" Inkvizicio ne timas kulpi malpermesitajn agojn laŭdire licajn, kulpi maljustaĵojn kaj kontraŭhomajn fiaĵojn pretekstante piemon. Kiujn ĝi laŭkaprice kulpigas pro herezo, tiujn ĝi truddevigas konfesi malveraĵojn per minacoj kaj turmentado kaj kiam ĝi ne tiel sukcesas eltiri el ili vortojn sufiĉe gravajn, por ke ilia senkulpeco estu kondamnita, mensogemajn atestojn ĝi subaĉetas." Tamen la inkviziciestro estis la konfesprenanto de la reĝo.

La pasiveco de la templanoj mirigas. Kelkaj diris, ke Jacques de Molay estus bruliginta ĉiujn ekzemplerojn de la regularo, kaj fratulo Johano el Châlons asertis, ke la 12-an de oktobro 40 kavaliroj forlasis la parizan komandorejon, veturigonte sub pajloamaso la templan trezoron en pezaj ĉaroj.

Oni scias, kiel la reĝo provis altiri al si la favoron de la popolo; kiel li agigis la dominikanojn; kiel, pere de Vilhelmo el Nogaret, li klopodis konvinki la universitatajn klerulojn pri la kulpeco de "tiuj lupoj aliigitaj al ŝafidoj, kiuj insultas al la religio kaj duan fojon krucumas Kriston." Eĉ al ĉiuj kristanaj princoj li sin turnis por ilin sciigi kaj peti de ili, ke ĉiuj kunagu same kiel li. La konfesojn, reprenojn de diritaĵoj, komplikaĵojn de la proceso, eĉ morton de la ĉefmajstro ni ne rediros, ĉar multaj verkoj estas al ĉio ĉi tio dediĉitaj. Nur kelkajn rimarkojn ni deziras prezenti por atentigi pri malpli ofte emfazataj flankoj de tiu misteroplena afero.

Ĉu eblas, ke tiaj idealistoj povintus surkraĉi la krucon, adori barbohavan idolaĉon, malkonfesi Jesuon en la momento de sia enoficigo? Povas esti, ke iaj ritoj estis miskomprenataj, fare ĉu de la eksigitoj ĉu de la pridemandantoj. Eble kelkaj fratuloj ĉeestis misterajn ritojn sen sufiĉa sinpreparado, ĉar, kiel dirite, ekzistis pluraj kononiveloj en la organizaĵo kaj certajn ŝojlojn ne ĉiuj povis transpaŝi. Ĉu la famaj kisoj sur sep korpopartoj, kiuj tiel skandalis, ne pensigas pri simbola akcepto-ceremonio, kiu pluvalidas en kelkaj tradiciaj organizaĵoj? La ĉi-koncernaj korpopartoj respondas la fundamentajn psikajn centrojn, kiuj devas esti vekataj, por ke la vivenergio cirkuladu kaj malvolviĝu en la kandidato, psike kaj spirite.

La 1-an de aprilo 1310 oni legas memuaron nome de la templanoj. Jen eltiraĵo:" La artikoloj bulee senditaj de la Papa Moŝto, tiu demandaro malhonesta, fia, senprudenta kaj abomena, jen mensogegoj senbaze teksitaj de la malamikoj de la ordeno." Famiĝis la ekkrio de la ĉefmajstro en la Insulo de la Judoj surŝtipare mortonta:" Post nelonge

malfeliĉo trafos tiujn, kiuj maljuste min kondamnas." Kaj laŭvice mortos pro kancero Klemento la Kvina, la koruptebla papo; Filipo la Bela estos deĵetata de sia ĉevalo; Vilhelmo el Nogaret pereos laŭ misteraj cirkonstancoj; la kulpigintoj pendumile balanciĝos.

GISORS- Tempe de la Gaŭloj, unu el la fortresoj, kie la kelta civilizo rifuĝis; sub la Romianoj, strategia pozicio izolita de la valo de Sejno, sed taŭga por kontroli la apudan arbaran regionon. Mezepoke, ĉar samdistanca al Parizo kaj Rouen, alirvojo al la potencaj episkopejoj en Pikardio kaj Ĉampanio. Oni diris, ke la Gisors-kastelo ilustras astronomiajn kaj astrologiajn leĝojn ĉar la plano prezentas la pozicion de la steloj kaj suno sur la ĉielo, tiaj kiaj la 23-an de decembro 1090. Tamen, fine de la XI-a jarcento, kiam la konstrulaboroj komenciĝis, la Templanoj ankoraŭ ne ekzistis kaj ili okupis la kastelon nur en 1148 kaj tie restis nur 3 jarojn. Fine de la XII-a jarcento Henriko Plantagenet ordonis taŭgarangojn en Gisors. Tie sub fama ulmo antaŭ la preĝejo Sankta Ĝervaso staranta, kunvenis la supre-dirita Henriko, Filipo-Aŭgusto kaj Gulielmo el Tyr, la ĉefepiskopo, kiu predikis la trian krucmiliton. Legendo asertas, ke pro mishumoro de ambaŭ reĝoj, la Francoj dehakis la arbon, kiu konsistigis gravan simbolon por la Angloj. Antaŭe normanda, Gisors estos franca ĝis la fino de la jarcenta milito. En 1419 Henriko la Kvina el Anglio perforte okupas la fortreson, sed ekde la dua duono de la XV-a jarcento paco regas kaj oni povas rekonstrui la multe difektitan preĝejon.

La ĉefturo, mirinda observejo, tiras la okulon. Ankaŭ notindas subtera pasejo, longa koridoro de la ĉefturo al la paroña preĝejo; aliaj subteraj lokoj, apude, kun grandaj niĉoj. Ekzistis kapelo, ne sub la ĉefturo, sed sub la paroña preĝejo tute senrilata kun la Templanoj. La nura akceptebla hipotezo povas esti, ke dum la XVI-a jarcento oni tie transportis kaj kaŝis objektojn kaj dokumentojn de la templa ordeno devenintajn, kiuj antaŭe estintus aliloke kaŝitaj. Laŭ tiu hipotezo oni ilin metintus en tiun kapelon, ĉar ili povus esti taksataj kompromitaj por la Eklezio. Historiistoj raportis pri kofroj en kripto enfermitaj. La Templanoj, sekrete sciigitaj pri la pereiga dato, havintus la tempon ŝirmi siajn sekretojn. Sed plĭ verŝajne supozindas, ke tia trezoro estintus prefere veturigata al Anglujo. Sed kial, eĉ per cemento, oni obstine reŝtopis la fositajn subterajn lokojn? Mistero regas plu. Cetere ĉu ne strange, ke la papo Klemento la kvina, ŝajne seninteresiĝis pri la sorto de la Ordeno?

Ankaŭ menciindas tezo, ne sur problablecoj, sed sur multenombraj dokumentoj baziĝanta. La kripto Sankta Katarina, kies ekzisto estas eksterduba, ricevintus kofrojn plenajn je dokumentoj, ne el la Templa ordeno, sed el mistera Siono-Priorejo fondita antaŭ le Templa Ordeno. Ambaŭ fondaĵoj, sekrete kunligitaj, disiĝintus en 1188. Tiu priorejo paralele supervivintus ĝis nia epoko kaj kelkaj templanaj dokumentoj estintus kunkaŝitaj. Sed dubinda estas la aŭtenteco ĉar neniu libro pri la kavaliraj ordenoj aludas tiun priorejon. Estis dirite, ke la Siono-Priorejo estus kaŝe disetendiĝinta el Jerusalemo ĝis la momento, kiam ties regantoj komprenis, ke ili bezonas organizaĵon en la ĉiutaga vivo integriĝantan. Tiel estus fondita la unua grupo de la Templa Ordeno, ekzotera milico sendota en la mondon, sub la aŭtoritato de la ĉiondecidanta Priorejo. Ĉi lasta estus kulpiginta la Templanojn pro la perdo de Jerusalemo kaj la fama dehakita ulmo estus la emblemo de la apartiĝo; tial neniu defenda voĉo sonis dum la fama proceso de la Templanoj.

S. BONIOL

Universalismo en la Revolucio de 1789 (2)

La angla tradicio kontraŭ la reĝa povo- Fakte, en Eŭropo, la unua parlamento estis angla, sed ne temis pri kreado de nacio, kie la civitanoj estus liberaj; temis, en 1215, por la potencaj baronoj de Anglio, rezisti al reĝa absolutismo. Dum la 13-a jarcento ekzistis rivaleco inter la reĝo kaj la altrangaj nobeloj, sed samtempe la granda plimulto de la loĝantoj estis servutuloj. En la 14-a jarcento la burĝoj sukcesis eniri en la popolan ĉambron (House of Commons), sed temis precipe pri aprobo de la impostoj truditaj de la reĝo. Poste, kiam la anglaj reĝoj provis imiti la absolutismon de la francaj reĝoj, okazis ribeloj kaj revolucioj en Anglio. Oni tranĉis la kapon de iu reĝo, okazis civila milito kaj diktatura respubliko... Okazis religia konflikto inter anglikanoj kaj puritanoj, lukto inter parlamento kaj armeo, poste nova konflikto inter anglikanoj kaj puritanoj sekvata de alia konflikto inter anglikanoj kaj katolikoj. El tiuj luktoj mi memorigos kelkajn oficialajn deklarojn de la Parlamento.

La postulo pri Rajtoj (1628) memorigas la Grandan Ĉarton de 1215 kaj riproĉas al la reĝo pagigi impostojn sen aprobo de la Parlamento: "Ni petas Vian Reĝan Moŝton respektigi la rajtojn kaj la liberojn establitajn de la leĝoj kaj statusoj de tiu reĝlando." Oni tre malproksimas de universalismo!

Habeas Corpus (1679) estas leĝo de la parlamento, kiu malpermesas la arbitrajn arestojn. (Ĉiu akuzito devas esti prezentita al juĝisto en la sekvantaj 24 horoj). Sed ĝi estis voĉdonita de Parlamento, kiu en 1673 voĉdonis la leĝon de la provo, laŭ kiu ĉiu ŝtatoficisto devis komunii laŭ la anglikana rito. Do ne temis pri vera politika kaj religia libero.

Deklaracio de la rajtoj (1689) La teksto listigas la malnovajn rajtojn kaj liberojn: la aprobo de la parlamento estas necesa por ŝanĝi la leĝojn; la aŭtoritato de la reĝo kontraŭ la leĝoj estas nelaŭleĝa; la regatoj rajtas prezenti petskribon al la reĝo ne riskante persekutojn; la reĝo ne povas vivteni armeon dum paca tempo sen aprobo de la Parlamento; la elektoj por la Parlamento devas esti liberaj; la libereco pri parolo en la Parlamento ne devas konduki al persekuto; necesas ofte kunvenigi la Parlamenton.

Kiel oni vidas, estas en tiuj deklaroj neniu zorgo pri la homo ĝenerale kaj la nura libero por la simpla ulo estas petskribi, kaj por iuj inter ili voĉdoni sine de sufiĉe maljusta sistemo.

La deklaracio pri sendependeco de la Unuiĝintaj Statoj (1776)- Temas pri deklaro de la apartigo inter la reĝo de Britio kaj la amerikaj kolonioj, kiuj fariĝos nova ŝtato. La redaktintoj tiel klarigas la necesecon de antaŭa deklaro. "Kiam en la fluo de la homaj eventoj, ŝajnas al iu popolo necese rompi siajn politikajn ligojn kun alia popolo, kaj akiri inter la potencoj de la tero la egalan kaj distingan rangon, al kiu la leĝoj de la Naturo kaj la Dio de la Universo donas rajton, la respekto, kiun ĝi devas havi por la opinio de la homoj postulas ke ĝi deklaru la kaŭzojn, kiuj trudas al ĝi tiun apartigon." Post tio, en la longa dokumento oni povas listigi tiujn universalajn argumentojn:

"Ni rigardas, kiel mem evidentaj veroj:- ke ĉiuj homoj estis kreitaj egalaj, ke ili ricevis de sia kreinto certajn nedoneblajn kaj nevendeblajn rajtojn;- ke el tiuj rajtoj estas la vivo, la libero kaj la serĉo de feliĉo;- ke la registaroj estis starigitaj por sekurigi tiujn rajtojn, kaj ke tiuj registaroj tiras siajn justan povon nur de la konsento de la regatoj;- ke ĉiufoje kiam registaro fariĝas detruanto de tiuj celoj, la popolo rajtas modifi ĝin aŭ detrui ĝin por anstataŭigi ĝin de nova registaro...

Kompreneble, la deklaracio elvokas

la longan paciencon de la amerikaj kolonioj, kontraŭ la despotismo de la reĝo de Britio kaj listigas la petojn de la unuaj kaj la tiranajn rifuzojn de la alia. Poste venas la konkludo:" Konsekvence, ni, la reprezentantoj de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, kunigitaj en ĝenerala kongreso, post atesto antaŭ la supera juĝo de la universo pri la rektanimeco de niaj intencoj, je la nomo kaj aŭtoritateco de la bona popolo de tiuj kolonioj, ni do solene publikigas kaj deklaras, ke tiuj unuiĝintaj kolonioj estas kaj devas esti laŭjure liberaj sendependaj ŝtatoj..." Oni klarigas poste la rompon de la ligoj kun Britio kaj la eblon militi, konkludi pacon kaj aliancigi kiel konvenas al sendependaj Ŝtatoj.

****

UNIVERSALISMO KONTRAŬ APARTISMO

en la FRANCA REVOLUCIO- La reĝlando formiĝintis per aneksado de diversaj teritorioj al la primitiva reĝa bieno. La administrado de la reĝlando ofte konsistis en konservado de lokaj kutimoj, kiuj ŝanĝiĝis de loko al loko. Jam Voltero skribis:" de poŝto al poŝto, jurisprudenco tiel ofte ŝanĝiĝas kiel la ĉevaloj". Kaj la ministro Calonne diris en 1787: "Oni ne povas fari unu paŝon en tiu vasta reĝlando ne renkontante malsimilajn leĝojn, kontraŭajn uzojn, privilegiojn, malŝarĝojn, impostajn liberigojn, rajtojn kaj ĉiaspecajn pretendojn; kaj tiu ĝenerala dissonado malsimpligas la administradon, haltigas ĝian iradon, embarasas ĝiajn fortojn kaj obligas ĉie la elspezojn kaj la malordon..."

La konstitucio malcentralizigas Francion- Necesis inter la teorio de la "Deklaracio" kaj la administra realaĵo, trovi kompromison, ĉar kiel diris Mirabeau: "ni estas maljuna nacio, ni havas jam ekzistantan registaron, jam ekzistantan reĝon, jam ekzistantajn antaŭjuĝojn. Necesas kiel eble plej harmoniigi ĉiujn tiujn aĵojn kun la Revolucio kaj savi la tujecon de la trapaso".

Oni dividis Francion en 83 departementojn mem dividitaj en distriktojn poste en kantonojn kaj komunumojn. En tiuj novaj kadroj, la administrantojn elektis la enloĝantoj. En ĉiu departemento aŭ distrikto estis "konsilio" (kiu estis leĝdona), kaj direktorio (kiu estis la plenumpovo) kaj en ĉiu komunumo administris "komunuma korpuso" prezidata de urbestro. Tiu sistemo, kiu ne tiel bone funkciis, kiel oni esperis, baziĝis sur du kontraŭaj principoj: unue la departementoj, kun tute novaj geografiaj nomoj, malaperigis la historiajn provincojn, sed due oni provis kontentigi la aŭtonomecon petitan en la priplendaj kajeroj.

La morala renovigo de la judoj-

En 1788, responde al konkurso de la reĝa societo pri sciencoj kaj artoj en Metz, la abato Gregoire verkis "eseon pri la fizika, morala kaj politika renovigo de la judoj". Post klarigo laŭ kiu apartigo kaŭzis tiun degeneron (en la regiono la judoj vivis tre mizere), li proponas la jenajn rimedojn.

1) Necesas elradikigi tiun ĵargonon ĝerman-hebre-rabenan, kiun uzas tiuj ĝermanaj judoj, kiu estas kompreneblа nur de ili, kaj kiu plidikigas la nescion kaj kaŝas la malsincerаĵojn (temis pri la jida lingvo).

2) Necesas batali kontraŭ la talmudaj revaĵoj, kloako, kie amasiĝis la deliroj de la homa spirito.

3) Necesas detrui iliajn ritojn kaj burleskajn religiajn tradiciojn, kiuj estas nur bagateloj.

Kompreneble la abato tiam parolas je la nomo de la racio, je la nomo de tio, kion oni nomos poste "jakobenismo", kiu celas atingi la universalan homon, deprenante ĉion, kio malpermesas la pason de la lumoj de la racio. Fakte tiu abato Gregoire, kiu estas samtempe iu katoliko kaj iu homo de la lumoj, probable tre sincere kredis, ke, kiam ili estos prilumitaj de la racio, la judoj fariĝos tute nature katolikoj. Kontraŭ tiu opinio oni povas citi la rimarkon de Mirabeau kiu, pri la sama temo, verkis eseon "Pri la politika reformo de la judoj". Pri la specifaj ritoj de la judoj

li demandas:"sed kiu ne havas tiajn?" Trans la diversaj argumentoj, la fakto estas, ke same kiel la protestantoj, la judoj fariĝis francaj civitanoj kun la samaj rajtoj, kiel tiuj de la katolikoj.

Kiuj estas la limoj de la nacia teritorio?- En la teritorio administrata de la nova sistemo ekzistis regionoj, kie fremdaj nobeloj havis feŭdojn. Tio okazis en Alzaco kaj en Avinjono. Al la ĝermanaj princoj la asembleo respondis:" ne la traktatoj de la princoj reguligas la rajtojn de la nacioj... Ne gravas por la loĝantoj de Alzaco, ne gravas por la franca popolo, la akordoj, kiuj en tempoj de despotismo unuigis la unuan al la dua. La Alzaca popolo estas ligita kun la franca popolo ĉar ĝi tion volis: nur ĝia volo legitimis la unuiĝon."

Pri la regiono ĉirkaŭ Avinjono, okazis plebiscito, kaj la enloĝantoj voĉdonis por la unuiĝo per 102 000 voĉoj el inter 150 000. Spite al la protestoj de la papo, la asembleo dekretis la 12-an de septembro 1791:" laŭ la libere esprimita deziro de la enloĝantoj, Avinjono kaj ĝia regiono estas aneksitaj al la reĝlando".

La nova nocio pri nacio- En tiu administrado, kies malcentraligo estis tiel granda, anarkio estis konstanta danĝero. Fakte, la unuiĝo venis de la popolo. La 29-an de novembro 1789, la "patriotoj" de Daŭfenlando kaj de "Vivarais", kiuj situas ambaŭflanke de Rodano, kunvenis en la urbeto "Etoile", en la rodana valo kaj ĵuris, ke ili restos ĉiam unuigitaj, ili protektos la cirkuladon de la nutraĵoj, ili obeos al la leĝoj de la konstitucianta asembleo.

En Pontivy, en januaro 1790, la delegitoj de 80 urboj de Bretonio kaj Anĵuo, solene deklaris, ke ili estas "nek bretonoj nek Anĵuanoj, sed Francoj kaj civitanoj de sama imperio". La patriotoj de Alzaco, Loreno kaj "Franche-Comte" kunvenis en Strasburgo la 13-an de junio 1790; ili decidis federiĝi kaj metis flagon ĉe la Rejno (sur la ponto al Kehl) kun la deklaro:" Ĉi tie komenciĝas la lando de libereco".

Tial la asembleo decidis organizi grandan feston, por kreado de Nacia Federacio, okaze de la datreveno de la konkero de la fortikaĵo Bastille, la 14-an de julio 1790. Oficiale, la nacia festo de Francio memorigas tiun eventon kaj ne la batalon de 1789.

La eĥoj de la revolucio en Eŭropo- En Nederlando (1785-1787)- Okaze de la milito pri sendependeco de la unuiĝintaj ŝtatoj de Ameriko, la unuiĝintaj provincoj (tiama nomo de Nederlando) partoprenis la militon kontraŭ la angloj, kun la francoj kaj la usonanoj. En Amsterdamo la presado estis praktike libera kaj la Nederlandaj urboj estis la centra presejo de Eŭropo. La estro de tiuj provincoj (Stathouder) Vilhelmo la 5-a, kun la helpo de "oranĝista" partio deziris plifortigi la plenuman povon. Estis du opoziciaj partioj, la partio de la regento (burĝoj kaj lokaj administrantoj), kaj la patriota partio (liberalaj burĝoj kaj nobeloj). Tiuj opoziciaj partioj apogis la leĝdonan povon. En 1786 la "patriotoj" gajnis la balotojn en Amsterdamo kaj Roterdamo, kaj Vilhelmo estis forpelita de la povo. Li tiam petis la helpon de Anglio kaj de Prusujo (lia edzino estis la fratino de la reĝo de Prusujo). La prusa armeo invadis la teritorion, kaj restarigis la povon de la estro. Tiam multaj patriotoj fuĝis al Francio, kie ili poste partoprenos la francan revolucion.

F. BOYET

La konkludo de tiu serio de artikoloj pri "Universalismo en la Franca Revolucio" (Kulturaj Kajeroj n° 1989/4 kaj 1990/1) aperos en la venonta numero.

Projektoj de Universalaj Lingvoj en la epoko de la Franca Revolucio

Ĉar oni lasttempe celebris la ducentan datrevenon de la franca revolucio, povas esti interese iom paroli pri la projektoj de diverstipaj universalaj lingvoj, kiuj naskiĝis en tiu epoko. Necesas tamen tuj rimarki, ke la mondo de la dua parto de la 18-a jarcento, funde diferencis de tiu de la dua parto de la 19-a jarcento, kiam kreiĝis la necesaj kondiĉoj, kiuj ebligos la naskiĝon de lingvo kun la karakterizaĵoj, ekzemple de esperanto. Pli ol la naciaj lingvoj, la multaj regionaj dialektoj estas la solaj ĉiutagaj esprimrimedoj de granda parto de la popoloj, kies malaltaj tavoloj, cetere, tute ne partoprenis la intelektan vivon aŭ la internaciajn rilatojn. Krome unu lingvo hegemonie regis en Eŭropo por la superaj klasoj; temas pri la franca lingvo, kiu estis la laŭmoda kaj preferata lingvo de la privilegiitaj medioj, eĉ se Montesquieu kaj Voltaire jam estis rimarkintaj la maloportunecon de la multlingveco.

Oni kutime opinias, ke la publikigado de la Enciklopedio de la sciencoj, de la artoj kaj de la metioj, sub la gvidado de Diderot, inter 1751 kaj 1772, konstituis la grandan turniĝon de la filozofia pensado de tiu historia momento kaj ,parte, preparis la postajn revoluciajn okazontaĵojn.

Ĝuste , en tiu granda Enciklopedio, en la volumo naŭ, kiu aperis en 1765, oni trovas sur kvar paĝoj artikolon pri "nova lingvo", redaktita de iu s-ro Faiguet de Villeneuve, trezoristo de Francio. Temas pri propono por racionala aposteriora lingvo, en kiu, kurioze, oni jam trovas kelkajn verbfinaĵojn, kiujn ni retrovos en la lingvo de Zamenhof, cent dudek jarojn poste. Ankaŭ kiel en esperanto, en la projekto estis nur unu helpa verbo:" sas". Kiel jam skribite estas kurioze trovi diversajn verbajn finaĵojn, kiel "is, as, us, ont," kiujn, tamen, Zamenhof ne uzos sammaniere. La kalkulado estas regule aranĝita, kiel en esperanto. Faiguet ne faris provojn ellabori vortaron, lasante tiun taskon "por la akademioj". Unu el la gvidantoj mem de la Enciklopedio, d'Alembert, ĉirkaŭ la jaro 1770, prilaboris proponojn pri universala lingvo. En 1774 la fama franca sciencisto Condorcet, laŭ Drezen en la "Historio de la Mondolingvo", dediĉis kelkajn paĝojn al esploro de la problemo de filozofia sistemo de la lingvo.

Pli poste, en 1793, en plena tragika kriza momento de la franca Revolucio, la juna Ampere, la estonta granda fizikisto, kiu estis tiam dek ok-jara, kreis sistemon de lingvo pri kiu ni nun nenion plu scias. En 1794, iu civitano, Delormel, prezentis al la franca Nacia Konvencio alian planon de universala lingvo. La gramatiko kaj la vortaro estis tute aprioraj. Tio signifas, ke ĝi konsistis el materialo tute elpensita, fabrikata de la aŭtoro. Delormel skribis, ke li celas "kunigi la homojn kaj popolojn per delikataj ligiloj de frateco", pere de komuna, logika kaj regula lingvo, ĉar la naciaj lingvoj "prezentas ĉiupaŝe malregulaĵojn, kiuj faras tiujn lingvojn malfacilaj kaj postulas daŭran tempon por ilia ellerno." Delormel precizigis, ke li "ne konsideras en tiuj vortoj, lingvon, kiu forigus aŭ anstataŭus la aliajn".

Oni tiel konstatas, ke, unu jarcenton antaŭe, Zamenhof havis spiritajn prapatrojn, ĉu ne?

La Nacia Konvencio, en sia kunsido de la 16-a de novembro 1794, preskaŭ kvar monatojn post l'ekzekuto de Robespierre, aŭskultinte la raporton de Delormel, deklaris ke "respektante la majestecon de la ideo, kiun prilaboris multaj sciencistoj de la lasta jarcento", decidis sendi la projekton de Delormel

al la komisiono de popolklerigo. Bedaŭrinde, pro la gravaj okazaĵoj de tiu historia epoko, la projekto de Delormel estis entombigita en la komisiono de la Konvencio.

Dum tiu fino de la 18-a jarcento, la projektoj de universalaj lingvoj floris ankaŭ eksterlande, en Germanio, en Italio, en Anglio. La komenco de la 19-a jarcento alportos plian faskon da projektoj.

Por konkludi oni povas diri, unue: ke la homa penso estas de longe okupata de la problemo de internacia interkompreniĝo; due, ke la vojo estis longa inter la pure intelektaj, filozofiaj planoj de Descartes kaj de liaj disĉiploj kaj la plene vivanta, riĉa, funkcianta internacia lingvo de Zamenhof, kun ĝiaj verkistoj, poetoj, teknikaj terminaroj, ĝia disvastiĝo inter homoj de ĉiuj haŭtkoloroj.

Mankis dum la pasintaj jarcentoj, la materiaj necesaj kondiĉoj: la modernaj komunikadaj rimedoj, la fervoja, la aertrafika retoj, la pli ĝenerala instruado, la partopreno de grandaj homamasoj en la internaciaj kontaktoj, la nun komenciĝanta eksplodo de la informado.

Kiel skribis Petro Stojan: "esperanto estis de longe ĝerminta frukto, maturinta dum multaj generacioj kaj fine rikoltita de la homo, kiu, en taŭgaj momento kaj loko, troviĝis en la centro de interkrucantaj linioj de sociaj fortoj, influoj kaj ideoj."

André FRANGEUL

****



Kien li iras?

Al GRESILLON, kompreneble.

Ĉu ankaŭ vi?

Petu informojn: ESPERANTO
Kastelo Gresillon. 49150-BAUGÉ

VIVU LA ANGLA LINGVO!

R.Rossetti

Viro renkontis foje amikon, kiu ĵus revenis de libertempo en Francio. "Ĉu vi havis multe da malfacilo kun via franca lingvo?"li interesiĝis. "Tute ne!" respondis la alia."Estis la francoj, kiuj havis la malfacilon!" Analoge mi supozas, ke la francoj, kiuj redaktas la anglalingvajn anoncojn por niaj turistoj en Francio, spertas ĉe tio nenian ajn malfacilon kun la angla lingvo. Sed al ni la teksto de tiuj anoncoj faras almenaŭ sufiĉe da amuzo. En francaj vagonoj oni admonas, ke oni ne kliniĝu el la fenestro: DANGER TO LEAN OUTSIDE. Estus malfacile klarigi al la francoj, ke tio simple ne estas angla. Rekta gramatika eraro apenaŭ troviĝas en tiu frazo. La misuzo de OUTSIDE anstataŭ OUT estas ja eraro. Sed la stranga "DANGER" estas nenio pli ol neidioma formo. Ĝi tuŝas nin groteske nur tial, ĉar ni ne kutimas diri ĝin; ni diras IT IS DANGEROUS.

Sur letero, kiun mi ricevis de franca firmo, troviĝis la presita noto:"For all informations write with a stamp for answer to..." Ĉu tiu frazo aromas, kiel angla lingvo? Nun faru la jenan eksperimenton. Traduku la lastan frazon laŭvorte en Esperanton. Vi konstatos, ke vi ricevos frazon tute naturan kaj bonan. Kial? Ĉar en Esperanto, kio estas gramatika kaj logika estas bona, sed en la angla lingvo frazo povas esti gramatika kaj ankaŭ logika, kaj tamen esti malbona, ĉar ĝi ne estas kutima. La anglalingva tradicio estas nepelaciebla kaj ankaŭ neniam plene regebla de alilingvano. Neniu lingva sento (kian oni povas akiri pri aliaj lingvoj) orientos lin; aŭ li scias, aŭ li devas pafi hazarde, kaj verŝajne maltrafi.

Mia svisa studento-kuzo foje diris al mi:"Mi scias la francan kaj anglan lingvojn proksimume same bone; sed dum mia franca lingvo fluas, mia angla ne fluas. Mi devas meti vorton al vorto preskaŭ mekanike.

Fuŝtekstoj troviĝas ne nur ĉe privataj entreprenoj, sed ankaŭ ĉe la plej gravaj monumentoj. En la baziliko Sacré-Coeur en Parizo staras tabulo kun la peto: PLEASE FOR THE STAINED GLASSES WINDOWS OF THE BASILICA DURING THE WAR DAMAGED. Tio estas simpla piĝeno. Tamen se oni esperantigas ĝin laŭvorte ĝi sonas jam sufiĉe bone. Ĉu vi rimarkis, kial ĝi bone sonas? Nu tial, ĉar "difektitaj" akordas kun "vitraloj", do evidente rilatas al ĝi, kaj ne (kiel en la angla lingvo) kvazaŭ al "war" (milito). "Bonvolu por la vitraloj de la baziliko dum la milito difektitaj".

Francaj komercaj produktaĵoj afektas anglajn nomojn (shampooings, smoking,...), kiel ni snobas per francaj nomoj por parfumoj, certaj profesioj... Kompreneble la francoj legas fide tiujn "anglaĵojn" kaj lernas ilin. Tiamaniere la "angla lingvo" vastiĝas kaj fariĝas internacia.

Kio okazos al nia kompatinda lingvo angla, nia propra instrumento, al kiu la industriismo kaj la imperiismo volas trudi la rolon de mondlingvo? Se tio ĉi estas la komenco, kian piĝenadon, kian kripligadon ĝi ankoraŭ suferos en milionoj da fremdaj manoj kaj buŝoj? La angla lingvo tia, kia ni ĝin konas, simple mortos sub torturoj, kaj ĝin anstataŭos ia lingvo ŝirata en ĉiujn flankojn, perfortita en rolon por kiu ĝi neniel estas adaptita.

La angla lingvo, kiel ĉiu nacia lingvo, estas esprimilo de aparta ekonomio kaj vivmaniero. En sia kadro ĝi verŝajne estas la plej taŭga instrumento. Sed se ĝi iras ekster tiun kadron, ĝi tuj komencas montri siajn mankojn. La internacian rolon ni lasu al la internacia lingvo, kiu,fleksebla kaj mirinde esprimpova, kapablas plenumi tiun taskon. La angla lingvo restu, laŭ sia destino kaj karaktero, nacia lingvo.

(Artikolo aperinta en "Verdstela Bulteno" (1960)

la ĉevalido

(Odd Tangerud)

Malsanulejo estas bona loko por konatiĝi kun homoj. Dum atendo de operacio ili marŝas tien kaj reen en la koridoroj, aŭ ili vizitas sin reciproke en la ĉambroj kaj sidas babilante por pasigi la tempon. Plej ofte oni profunde pristudas la diversajn malsanojn pro kiuj oni estas tie, sed kelkaj rakontemuloj redonas anekdotojn aŭ okazaĵojn el la kampara vivo.

"Ankaŭ mi foje agis, kiel kuracisto" diris la bienposedanto Gunnar Bergan, sidante ĉe mia lito.

"Ho, vi do ne volas komenci pri mi," diris mi el sub la kusenego.

"Ne, sed mi foje savis la vivon de ĉevalido."

Vekiĝis mia intereso, ĉar en malsanulejo estas ĉiam bezonata io por sin distri kaj forgesigi el la pensoj zorgojn kaj timojn.

Jen lia rakonto:" Antaŭ kelkaj jaroj mi posedis ege belan ĉevalinon. Ne nur belan, sed ankaŭ bonhumoran kaj laborvolan. Mi multe ŝatis tiun beston, kaj kiam mi proksimiĝis al la paŝteja barilo, ĝi je unua vido tuj kuris al mi por froti sian molan kolon sur mia ŝultro. Ni vere amis unu la alian, kiel mastro sur bieno amas siajn bestojn kaj zorgas bone pri ili, kaj kiel la bestoj en reciproka dankemo amas sian mastron; La ĉevalino naskis idon frue en la printempo, kaj mi esperis havi novan ĉevalon kun la samaj bonaj kvalitoj, kiajn havas la patrino. La nasko okazis, sed ĝi estis malfacila, kaj la ido ne povis ekstari. Mi bone observis, kaj malkovriĝis, ke en la ventro de la ĉevalino, la feto kuŝis kun la antaŭaj piedoj kurbitaj malantaŭen al la kruroj. Kuŝante en tiu stato plurajn monatojn la muskoloj de la antaŭaj piedoj fariĝis tro longaj kaj estis perdintaj la forton. Samtempe la malantaŭaj muskoloj estis kuntiritaj kaj ne lasis sin streĉi. Mi kontaktis la bestkuraciston, mian bonan amikon post multjara kunlaboro.

"Estas neniu espero. Nur buĉu ĝin," estis la senkonsola konsilo.


Kun kurbata nuko kaj malalta kapo mi reiris hejmen. Do neniu espero. La ĉevalido ne povis ekstari por suĉi sian patrinon. Mi devis suprenlevi ĝin kaj teni ĝin ĉe la mamo. En la vespero mi iris en mian riparejon. Mi sidis longe en malgaja humoro sur mia rabotstablo. Komenciĝis mallumiĝi. Kvazaŭ en sonĝo mi vidis la ĉevalidon saltanta kaj kuranta sur la paŝtejo, kaj kvazaŭ sentis ĝin froti sian molan kolon sur mia ŝultro, kiel faris ĝia patrino. Kiel streĉi ĝiajn artikojn? Kiel fortigi la antaŭajn muskolojn?

Malespere mi frapis la stablon per lignobastoneto kuŝanta proksime. Mi ĝin rigardis. Ideo kaptis min. Mi trovis ĉizilon kaj komencis ĉizi sulkon laŭlonge de ĝi. Mi faris ĝin tia, ke ĝi povus enteni en si la kruron de la ĉevalido. Kvar tiajn mi faris. Mi ligis ilin al la antaŭaj kruroj de la ĉevalido, kaj tiel la malfortaj artikoj teniĝis streĉitaj tiel ke la ĉevalido povis stari kaj iomete marŝi kvankam ne kuri. Per tiuj artefaritaj apogiloj ĝi povis nun stari ĉe sia patrino kaj mem atingi la nutrodonan mamon.

Dum semajno aŭ du mi daŭre devis atenti pri ĝi kaj helpi ĝin ekstari, sed poste ĝi bone sukcesis mem. La malmolaj lignaĵoj ĉirkaŭ ĝiaj kruroj certe ĝenis ĝin malagrable, sed estis ja la sola alternativo al buĉo. Kaj la ĉevalido fariĝis la ŝatata amiko de ĉiuj en la bieno. Stumble ĝi sekvis nin en la paŝtejo, kiam ni serĉis ĝin kaj la ĉevalinon por kontentigi nian bezonon karesi kaj dorloti vivantajn estaĵojn. Estis kiel en hejmo, kie naskiĝis kripla infano. Ĝi ofte fariĝas la dorlotulo de ĉiuj en la domo.

Iun tagon mi sendis mian serviston al la urbo por fari kelkajn aĉetojn kaj ripari etan difekton en la aŭto. En la aŭtoriparejo li vidis brakodikan kaŭĉukan tubon. Li petis

ĝin de la riparisto, kaj por malgranda sumo li povis ĝin aĉeti. Hejme li trančis la tubon laŭ la longo kaj faris el ĝi kvar bandaĝojn por anstataŭigi la malmolajn lignajn subtenilojn. Ekipita per tiuj sufiĉe agrablaj bandaĝoj la ĉevalido pli kaj pli komencis kureti kaj eĉ salteti. Dum la tuta somero ni sekvis ĝian evoluon kun karesemaj rigardoj. Grade ĝi kondutis pli kaj pli normale, kaj la artikoj kaj la antaŭaj muskoloj de la kruroj plifortiĝis. Mi forprenis la bandaĝojn kelkajn minutojn iun tagon. Poste mi plilongigis tiujn periodojn, kaj en aŭtuno la ĉevalido kuris kaj saltis same lerte kaj forte, kiel aliaj ĉevaloj.



Mi vizitis la bestkuraciston. "Nu, ĉu vi nun havas novan ĉevalidon?" li demandis. "Ne," mi respondis. "Mi havas la saman ĉevalidon, kiel antaŭe. Ĝi nun estas same forta, kiel siaj samaĝuloj kaj sen iu ĝeno kuras kaj saltas vigle en la paŝtejo."

Mi rakontis al li pri la kuraca laboro, kiun mi faris. Li rigardis min, kiel nekredulo.

"Kiu estus tion kredinta?"

Tiel finiĝis la rakonto de la amiko, kiun mi trovis en la malsanulejo.

****


Ĉu vi scias ?

KIO ESTAS STONEHENGE ?

En la sudo de Britio staras fama loko de megalitaj kultoj. Admirindas, en la tago de printempa solstico,matene, la unua sunradio trapasanta la mallarĝan fenestron de la ruina templo kaj prilumanta la altaron. Tiam, la anoj de druidaj societoj kunvenas por celebri la antikvan sun-kulton.


Sur la vasta erikejo, kiu etendiĝas antaŭ la malnova templo, staras granda nombro da ŝtonoj similaj je la bretoniaj menhiroj. Jam de longe oni opinias, ke tiuj ŝtonvicoj montras astronomian orientiĝon. Koncerne Stonehenge, la arkeologoj longtempe ne sciis precize kiel interpreti la aranĝon de la starantaj ŝtonoj.

La alveno de la komputero ebligis malkaŝi la signifon. Prof. E.S. Hawkins uzis tiun aparaton por fari planon de la ĉielo tian, kia ĝi estis antaŭ kvarmil jaroj, kun la tiama situo de la planedoj kaj de la plej gravaj steloj. Tiam la britaj arkeologoj povis montri, ke Stonehenge estas astronomia kalendaro. Ne mirige, ĉar la Majaoj, centr-amerikaj Indianoj, starigis steleojn antaŭ siaj temploj por signi la grandajn astronomiajn ciklojn.



SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

POR VIA DISTRO



ENIGMO

La solvo konsistas el 119 literoj, kiuj estas numeritaj. Jen la ŝlosilvortoj:

15.23.13.32.1.37.5.2.33.48: fervoja maŝino

4.3.10.29.9.21.11.60:senpieda besto

24.25.57.58.76.70.92.78.77.72: usona ŝtato

50.51.111.114.115.61.63.27.74: tre altranĝa pastro

45.6.103.104.7.55.12.35.85: feliĉporta objekto

36.19.73.23.1.14.91.10.32: vojmezuro

17.20.111.112.49.16.80.37: nokta koncerteto

84.83.106.105.107.42.56.48: reĝa familio

38.71.34.65.43.44.28.8.96.2.41.59.60.26: hazardnegocisto

69.68.67.66.86.5.19.87.70: sankta tero

116.117.118.56.110.39.72: longorela dombesto

18.46.52.53.74.98.85: hinda insulo

62.30.100.22.79.89.23.21.32: iama greka urbo

64.40.35.93.94.92.37: monato

13.97.10.54.31.101.109.48: sanigado

47.119.75.113.49.60: blua kampa floro

82.81.61.11.95.90.24.80.99: tricifera nombro

88.4.29.108.92.102.78.42.70: glora lingvo

1 - 119: profetaj vortoj de Louis Pasteur.

Paĝo de la Geknaboj

La Vojaĝo

Ĉu vi havas fantazion? Ĉu foje vi pensas pri homoj aŭ aliaj estaĵoj, kiuj povas vivi sur aliaj planedoj? Ĉu vi ŝatus renkontiĝi kaj amikiĝi kun ili?
En Bradford, urbego de norda Anglujo, loĝas Jayshree Shah (Gejŝri Sa), 13-jara knabino, kiu ne nur pensas pri aliplanedanoj kaj ŝatus renkontiĝi kun ili sed ankaŭ havas grandan fantazion. Falis en miajn manojn antaŭ kelkaj tagoj rakonto, kiun faris Jayshee pri vizito al alia planedo kun sia aliplaneda amiko IT. Tradukis ĝin en Esperanton juna anglo, Gregory Porilo, kaj mi decidis dividi kun vi la komencon de ŝia aventuro.

****

Antaŭ multe da tempo, ĉirkaŭ lasta lundo, mia amiko, la longeperdita aliplanedano, skribis leteron al mi, kiu diris:

.eerhsyaJ notulaS
al la niv sativni iM
.norepsev ŭaidoh ocalaP
.norepsev ŭaidoh niv sodiv iM
TI

Tiun nokton, IT kontaktis min dum mia dormo. Li diris: "Saluton. Mi ne vidis vin dum longa tempo. Venu." IT surportis folian mantelon, kiu kovris liajn vizaĝon kaj korpon. Antaŭ ol mi povis respondi, IT celumis akvopistoleton al mi, kaj pafis. Dum kelkaj sekundoj IT transdonis min de la Tero al Futudull.

Futudull estis la plej malbrila sed ankaŭ la plej interesa loko, kiun mi iam vidis. La ĉielo estis griza, la arboj brunaj, kaj la herbo estis ruĝbruna. Kiam mi vidis la alian duonon de la lando mi miregis. Ĉio estis pitoreska. Sed kio vere mirigis min estis, ke ĉio estis moderna. Nubskrapuloj, komputerizitaj butikoj, la plej novaj elektraj varoj, kaj tiel plu.
Mi ekvidis ion. Ĝi estis tabula, kiu diris:

VENDITA AL ANGLUJO

POR LA JARO 2000

Mi ne povis resti dum pli da tempo do ni reiris al la hejmurbo de IT, kiu nomiĝas Dully. Tie, IT montris al mi sian domon. Li eniris sian kavernon, demetis sian folian mantelon, kaj mi vidis lian korpon. Mi kredis, ke mi svenus, sed iel mi resaniĝis.

IT havas vizaĝon, kiel tarantulo, kiu enhavas tri malgrandajn pilkojn, kiuj elpendas per risortoj. IT havas grandan kavan truon por la nazo, per kiu IT enspiras sian nutraĵon. La kapo de IT estas fiksita al lia ŝultro per peco de ŝnuro. Lia korpo (la ŝultro malsupren) estas el travidebla plasto. Ĝi enhavas tordiĝantajn serpentojn kaj insektojn, kiuj serĉas ion manĝeblan.

Mi demandis, kiom da jaroj IT havas, sed IT diris, ke li ne scias ĉar li ne povas nombri la sulkojn sur sia dorso. IT diris, ke li naskiĝis, kiam li havis kvindek kvin jarojn kaj li mortos, kiam li havos unu jaron. Mi diris al IT, ke li havas dek du jarojn.

****

Ĉu vi povas desegni la amikon de Jayshee? Ĉu tiaj vi imagas aliplanedanojn? Fantaziu mem kaj rakontu al ni pri via aliplaneda aventuro. Eble ĝi estos eĉ pli ekscita ol tiu de Jayshee.

Se vi deziras legi la tutan aventuron de Jayshee, skribu al la Sud-Londona Esperanto-Grupo, 27 Brenda Road, Upper Tooting, London, SW17 7DD, kiu eldonis ĝin en Esperanto.

AUDREY



LA VIVO EN GRESILLON

Kiamaniere helpi la Esperanto-Domon ekster la staĝo-periodoj? Tiun demandon oni denove faris al ni. La respondo estos la sama, kiel jam farita. Diskonigu viajn spertojn kaj instigu viajn amikojn, francajn kaj eksterlandajn, viziti Gresillon. Tiu rimedo estas la plej grava, ĉar ĝi pligrandigas la rondon de niaj amikoj kaj ankaŭ alportas financan helpon. Vi kompreneble povas fari donacojn, grandajn aŭ ne. Vi povas reklami niajn perkorespondajn kursojn al amikoj, en kies urbo aŭ vilaĝo ekzistas neniu kurso. Ankaŭ grava estas, por vi, por ni kaj por Esperanto, ke vi fariĝu regula kliento de nia Libro-Servo. Kaj ne forgesu, ke subteni Kulturaj Kajeroj signifas subteni ankaŭ Gresillon. Jam pluraj abonantoj pagas unu aŭ du pliajn abonojn por esperantistoj loĝantaj en nepagipovaj landoj... aŭ tutsimple mem decidas plialtigi la abontarifon!

Vidu! Ne mankas la rimedoj helpi nin. Antaŭdankon!



NE PLU CERBUMU

NUR PETU LA KATALOGON DE NIA

Libro-servo

ADRESO:

J. VINCENT, 26bis rue de Milngavie
F- 49150 BAUGE

Perkorespondaj kursoj

KOMENCANTOJ: 16 lecionoj 150 f.
PRAKTIKADO : 14 lecionoj 150 f.
SUPERA KURSO: tradukoj kaj studotaj verkoj: 100 f.

} materialo kaj korektado

NIA KONKURSO

Solvo de la enigmoj proponitaj en K.K. 89-4

1 — Doroteo aĉetis 47 ovojn en Klaĉnest.

2 — La nomoj de diversspecaj bestoj kaŝiĝis en la teksto, sed ne ĉiuj tiuj bestoj kutime vivas en arbaro. Oni povas tamen kalkuli ĝis dudek nomojn.

Gajnis la Librojn.

S-ino P. NAULET, Breil : 200 frankojn.

F-ino M.-J. BERGER, Clermont-Ferrand : 150 frankoj.

S-ro G. RABATEL, Lyon : 100 frankoj.

NIA TUTJARA KONKURSO

Ek de tiu ĉi numero komenciĝas nova granda konkurso, kiu daŭros dum la tuta jaro (4 sinsekvaj numeroj). En ĉiu numero estos proponitaj 4 enigmoj, kiuj povos doni ĝis po 5 poentoj. Ju pli da poentoj ricevitaj des pli da ŝancoj esti premiita. La partoprenantoj rajtas sendi siajn respondojn post ĉiu serio de enigmoj, aŭ ĉiujn kune post la lasta. La tuton oni estu sendinta plej malfrue la 15-an de februaro 1991.

La premioj estas :

1 — 1000 f.f. por restado en Gresillon.

2 — 500 f.f. por restado en Gresillon.

3 — 250 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

4 — 150 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

5 — 100 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

UNUA SERIO

1 — Jen la titoloj de kelkaj libroj ; sed aperas nur la konsonantoj. Bonvolu aldoni la vokalojn. Donu ankaŭ la nomon de la verkintoj.

L BN LNGV
RGLS
VRMS N RM
L LT VKHRLĜ
L FNMN SPRNT

2 — La respondoj al la subaj demandoj troviĝas en tiu ĉi numero de la revuo :

— Kiu proponis en 1765 « novan lingvon », kies verbaj finaĵoj similas tiujn de Esperanto ?

— Kio estas « Habeas Corpus » ?

— Kion oni ofte trovas en la « Kajeroj pri plendoj » ?

— Kial Gisors estis loko grava por la Gaŭloj, la Romianoj kaj ankaŭ dum la Mezepoko ?

— Kial la « Esperantistus Gigantus » kelkfoje perdas siajn speciajn karakterojn ?

3 — La gvida ideo de iu multkonata esperantisto estis, ke « la progresigo de Esperanto ne devas esti ligita al unu persono, sed al institucio libere elektata de la esperantistaro mem ». Kiu estis tiu esperantisto ?

4 — Ĉu la subaj asertoj estas veraj aŭ ne veraj ? respondu « jes » aŭ « ne ».

— Gesroj ven VEENENDAAL estas la gepatroj de la nuna TEJO.

— Ili redaktis kaj eldonis la revuon « La Juna Vivo » jam en 1936.

— En 1988 la kongreso de SAT okazis en Brazilo.

— STELO signifas « Skolta Tutmonda Esperantista Ligo ».

— Oficiala « Esperanto-Tago » estis deklarita en Novjorko la 3-an de julio 1939.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent Khandallah - Wellington 4 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771, LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN